ÖSTERREICHISCHE NATIONALBIBLIOTHEK
709.752-C
ESP. M. 5

Nirnbergo, la 10. de Majo 1958.

Tre ŝatata Sro instruisto,

mia asocia sekretario, mia asocia Sano Sro superregistara konsilanto Albert Heuer Hannover, Sedan Str 17 skribis al mi, Vi estas preta, plenumi la taskon organizi la spirit liberecan aranĝajon dum la 43. Universala Kongreso de Esperanto en Mainz, kune kun mia asocia Sano Sro Dro Georg Pick en Mainz Gartenfelder Str. 3.
Ankau mia asocia Sano Sro Dro Dietrich Brander Hannover Brühl Str. 9 skribis al mi, li estas preta, prelegi kaj li petis min, pripensi la financan aferon.
La sekretario de la „International Humanist and Ethical Union Utrecht-Holland 152 Oudegracht, la nederlanda Sano A. C. Terpstra-Heinrich sendis al mi broŝuron kiu havas la fundamentajn kaj celojn de la Humanisma kaj Etika Asocio.
La statuto donas al mi eblezi liberaj esperantistoj kelkajn eblecojn de la aliĝo kaj interligado.
La sekretario de la Brita Liberpensula Esperantista Asocio, mia Sano George L. Dickinson Liverpool 10 Gribble Road 21 sendis al mi la statuton.

709.751-C. Esp. M. 5
Österreichische Nationalbibliothek Digitale Services

Mia opinio estas: uzi la kunven-eblecon en Mainz por formigi ĉiujn esperantistojn kaj eklezi-liberajn fortojn por komuna afero. Ĉi tiu ebleco ne tiel baldaŭ revenos.
Se la Universala Kongreso de Esperanto estas en eksterlando, la propono de ĉi tiu intenco estas pli multekosta por ni en Germanujo.
Granda nombro de la eklezi-liberuloj en Germanujo ne estas membroj ĉe la Germana Popol Asocio por Spiritlibereco, ĉar ili ne konas kaj komprenas la verajn aferan-interrilatojn. Pro tio mi ankaŭ invitis la Germanan Liber-pensulan Asocion
(21b) Schwerte (Ruhr) Lichtendorfer Str 51
Kara Frato instruisto, se Vi legas paĝon 53 april-numero de la Esperanto Revuo Internacia, la Universala Esperanto Asocio estas pli potenca ol iam en sia tuta 50 jara historio.
La dua kongreso de la „International Humanist and Ethical Union" estis en London je la 26-31. de Julio 1957, sed la antaŭa historio estas pli ol cent jara.
Se ni komparas la historion de ambaŭ movadoj, venas al ni la demando, kial tiaj movadoj tiel longe estas fremdaj unu al alia?
Por kio ni parolas Esperanton? se ni ne estas kapablaj alproksimigi tiajn movadojn kaj alproksimigi la sekretariojn kaj la membrojn de ĉi tiuj movadoj.

en la aprila numero

Laŭ la paĝo 59 de la Esperanto Revuo Internacia
Dro Edmond Privat opinias:
en tiu diplomata mondo nenio estas facila,
sed persista pacienco estas necesa por atingi
sukceson.
Mi tre bone scias: malfacila estas la tasko
efektivigi mian intencon.
Zamenhof estis kontraŭ la absolutismo
kaj se ni estas por la toleremo ni sukcesos
ĉe la vivigo de la Humanista kaj Etika
Asocio
Zamenhof ne kreis Esperanton por paroli.

sed

li kreis Esperanton por agadi.
kaj ni Esperantistoj neniam forgesu: se ni
obligas la toleremon inter la humanismaj
kaj etikaj moradoj, ĉi tiu fakto montras
kaj pruvas la kapablecon de Esperanto.
Inter la 25 aŭstriaj, 24 svisaj, 372 germanaj
kongresanoj en Mainz estas eklezi fidelaj
kaj eklezi liberaj esperantistoj kaj pro tio, mia peno estas
inviti ĉiujn al nia aranĝajo, kiuj ne
tremas kaj ne ĝenas, esprimi siĉere la rezignon
de la eklezia absolutismo.
Stranga afero estas ĉar ankaŭ la Universala
Esperanto Asocio estas asocio kun la nomo
tutmonda, sed la plej stranga afero estas
por la ne-esperantistoj, ĉar ni esperantistoj
ĝenas, kuraĝe paroli pri ĉi tiu malsaneco

Multaj esperantistoj pagas al ĉitiu asocio
kotizon ĉar ili ne konas kaj komprenas
la verajn fakton-interrilatojn.
La Internacia Asocio de Juristoj Esperantistoj
aranĝas publikan juristan kunvenon kun
debato de la temo: „Libereco de la penso
–libereco de la esprimado"
Partoprenas en la diskutoj juristoj de
diversaj juraj sistemoj.
Prof. Ivo Lapena 77 Grasmere Avenue
Wembley Middlesex Britujo
Ĉitia kunveno estas por ni esperantistoj
la ĝusta loko por lerni: kiel kuraci la
malsanecon inter la anoj de la Universala
Esperanto Asocio:
neŭtraleco rilate de unuiĝoj kiuj havas
dogmoj=devigoj sed rifuzo de unuiĝoj
sen dogmoj=devigoj.
Mi ankaŭ aldonas la gazeton de la
Germana Liberpensula Esperantista Asocio.
Je la 15. Kongreso en Nürnbergo 1923 estis
laborkunsido de la humanistoj sed dek jaroj
poste la sangon soifanta glavo detruis ĉi
tiun pacan agadon. Se ni volas honorigi
niajn antaŭ=ulojn, ni daŭrigu la verkon
kiun ili 1933 interrompis.
Laŭ ĉi tiu spirito, laŭ ĉi tiu senco
mi salutas Vin

Via

Sano Ernst Gemeinhardt